Jarraporto por Grupo Esperantista de Trondheim, 2010

Okazintaĵoj

Klubaj kunvenoj

Dum 2010 okazis entute 15 ordinaraj klubkunvenoj, 1 jarkunveno, 1 ekskurso, 2 festoj (Ĝardena kaj Zamenhofa) kaj 2 estraraj kunvenoj. Ne okazis vortaraj laborkunvenoj en 2010. Male al la antaŭa jaro, en 2010 GET ne partoprenis en la popola procesio la 17an de majo.

En la ordinaraj klubkunvenoj partoprenis inter 4 kaj 11 membroj, meznombre 7,1 (meznombre en 2009: 6,5; en 2008: 6,6; en 2007: inter 6 kaj 7 personoj; en 2006: iom malpli ol 7). Ĉiuj kunvenoj kaj festoj okazis hejme ĉe membroj, sed la ekskurso okazis per velŝipo.

Por la plimulto el ordinaraj klubkunvenoj oni preparis temojn, pri kiuj respondecis specifaj personoj, ĉu estis prelegoj, prezentoj aŭ io alia. Dume aŭ poste okazis konversacioj pri la temoj, kaj ĉiam okazis ankaŭ kafklaĉo post la oficiala programo. Tiel la kunvenoj ebligis al membroj praktiki la lingvon. Komence de la kunvenoj Judith Parelie Abrahamsen prezentis malnetajn tradukojn de Pondus-strioj por diskutado en la klubo, okaze de iama onta eldono. La ordinaraj klubkunvenoj estis studkunvenoj kaj do subvenciitaj de la ŝtato pere de la studorganizo Populus. Temoj en 2010 estis:

- *Suneklipsoj.* Herman Ranes prelegis.
- *Ni tradukas Pondus-on.* Judith P. Abrahamsen preparis striojn.
- *Tradukado – «jeg skulle ønske du ville komme».* Torstein Kvakland preparis frazojn tradukotajn per imperativo.
- *La ezofago*. Kjell Heggvold Ullestad prelegis.
- *Maroko.* Ulf Stenhaug prelegis.
- *Velŝipo.* Audun Sødal parolis pri la velŝipo Nidaros kaj pri velŝipa ĵargono.
- *Skrablo.* Judith P. Abrahamsen ludigis la klubon per Skrablo en Esperanto.
- *Konversacia rondo.* La klubo parolis pri lastsemajnaj okazintaĵoj.
- *Sociaj medioj.* Judith P. Abrahamsen prelegis pri sociaj medioj en Interreto.
- *Paskinsulo kaj Ĉilio.* Herman Ranes prelegis kaj montris bildojn de sia vojaĝo.
- *Feriaj impresoj de Malajzio.* Ulf Stenhaug prelegis kaj montris bildojn de sia vojaĝo.
- *«Ĉiuj parolos kvin minutojn pri libere elektita temo.»*
- *Kubo.* Torstein Kvakland kaj Christian Fossen prelegis kaj montris bildojn de sia vojaĝo okaze de la Universala Kongreso.
- *Elvis Presley.* Kjell H. Ullestad prelegis kaj ludigis muzikon.
- *«Ĉiuj: Ni rekomendas kulturan eventon, teatraĵon, filmon, muzikon ktp.»*

Aldone al la jam menciitaj kunvenoj okazis ekskurso la 1an de junio per la velŝipo Nidaros, sub gvido de Audun Sødal.

Varbado, kursado kaj informado

Dum la printempo de 2010 Torstein Kvakland gvidis kurson por tri jamaj membroj.

Membrostatistiko

Fine de 2010 GET havis 19 membrojn (2009: 20; 2008: 21; 2007: 23; 2006: 25).

Partopreno en naciaj aranĝoj

En 2010 ne okazis naciaj aranĝoj en Norvegio.

Partopreno en internaciaj aranĝoj

Kvar GET-anoj partoprenis la Universalan Kongreson en Kubo: Torstein Kvakland, Christian Fossen, Tomas Jansson, Gunilla Frykholm (kaj aldone Helena, la filino de Tomas kaj Gunilla). Torstein Kvakland salutis por NEL kaj reprezentis NEL-on kiel Komitatano A.

Vortara laboro

Kunordiganto pri la vortara laboro de GET estis ankaŭ ĉi-jare Herman Ranes. En 2010 ne okazis laboro pri la nova vortaro, ĉar la responsulo pri la praktika laboro, Kjell Heggvold Ullestad, ne plu volas labori pri la tasko. Tio ŝuldiĝas al lia laborsituacio, kaj parte al la kvalitoj de la vortara materialo. Netan raporton ni ankoraŭ atendas.

Interreta aktivado

GET havas retpaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar Eggesbø Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL. Li ankaŭ administris la jenajn retpoŝtajn listojn: GET-lista, NEL-diskut kaj NEL-inform. Judith Parelie Abrahamsen kunadministris la paĝaron de NJE. Je la jarfino membris 23 en la retpoŝta listo de GET (25 en 2009 kaj 2008, 26 en 2007, 24 en 2006). Ne ĉiuj membras en la klubo. Dum 2010 sendiĝis ĉ. 80 mesaĝoj per la listo.

Biblioteko

La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Ranes. En 2010 okazis unu pruntedono.

Arĥivo

La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

Pasporta servo kaj aliaj vizitoj

PS-gastigantoj en Trondheim estas Ulf Stenhaug kaj Torstein Kvakland/Christian Fossen. Ĉe Torstein kaj Christian tranoktis svedo kaj polino.

Organiza numero

Jam en 2009 GET registriĝis en Enhetregisteret kaj Frivillighetsregisteret en Brønnøysund, kaj ricevis la organizan numeron 994 914 146. Ni ankaŭ membriĝis en Grasrotandelen, kaj ekrajtis ricevi monon de Norsk tipping se iliaj klientoj volas. Dum 2010 la klubo tiel gajnis 2007 kronojn (ne ĉiom pagita al ni antaŭ la jarŝanĝo 2010/2011).

Postenoj

Estraro dum 2010, elektita de la Jarkunveno la 23an de februaro 2010
Prezidanto: Torstein Kvakland (nova)
Kasisto: Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (reelekto)

Aliaj enklubaj postenoj, elektitaj de la Jarkunveno la 23an de februaro 2010
Revizoro: Jørgen Åldstedt (reelekto)
Vicrevizoro: Arne Olav Mjøen (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen Åldstedt kaj Arne Olav Mjøen (reelektoj)

Eksterklubaj estraraj postenoj de klubanoj dum 2010
Prezidanto de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Vicprezidanto de NEL: Ulf Lunde (loĝanta en Os en Hordaland)
Vicrevizoro de NEL: Ulf Stenhaug
Anstataŭanto al la estraro de NEL: Arne Olav Mjøen
Sekretario de NJE: Einar Faanes (loĝanta en Stockholm)
Estrarano de Legaco Uhlen (kasisto): Arne Olav Mjøen
Persona anstataŭanto por Arne Olav Mjøen en Legaco Uhlen: Torstein Kvakland
Prezidanto de Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Estraranoj de Akademia Esperanto-Forumo: Herman Ranes kaj Kjell Heggvold Ullestad

Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj dum 2010
Elekta komitato de NEL: Christian Fossen
Domkomisionanoj por NEL: Torstein Kvakland, Herman Ranes
Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Gazetara Servo de NEL: Torstein Kvakland
Komisiono de NEL pri radio kaj televido: Christian Fossen
Komitatano A de UEA: Torstein Kvakland
Kunadministranto de la TTT-paĝaro de NJE: Judith Parelie Abrahamsen
Delegito de UEA: Ulf Stenhaug
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland
Fakdelegitoj de UEA: Ulf Lunde (komputiko), Jardar Eggesbø Abrahamsen (lingviko) kaj Tomas Jansson (onkologio)
Grafikisto de *Norvega Esperantisto*: Judith Parelie Abrahamsen (muntas nur la frontpaĝon kaj *Inter Ni Dirite*)
Paguta laborunto de la redakcio de la nova vortaro: Kjell Heggvold Ullestad
Aliaj membroj de la redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Herman Ranes

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.
Aprobita de la Jarkunveno de GET la 22an de februaro 2011.